

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Febr. 1946

34 årg. Nr 2

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Världsappell för Esperanto!

Freden, världens nya ansikte, håller på att utformas, och Förenta Nationerna sammanträder i London. Vilket utseende världen än kommer att få, kan man aldrig komma ifrån behovet av ett världshjälpsspråk för att nå de mål man uppställt: samförstånd, samarbete och fred mellan folken.

Internacia Esperanto-Ligo (IEL), som har sitt säte i London, har till alla nationers esperantoförbund riktat en vädjan att samla namnunderskrifter för en hela världen omfattande masspetition till F.N., så lydande:

Deklaration.

Jag anser, att frågan om ett internationellt språk är så viktig, att Förenta Nationerna bör ägna densamma en snabb och noggrann prövning.

Jag anser, att ett världshjälpsspråk, avsett att komplettera de nationella språken men ej att ersätta dem, är nödvändigt för att underlätta förbindelsen mellan jordens folk och att främja samhällsutvecklingen.

Då esperanto, det enda hjälpsspråk som haft väsentlig framgång, redan användes över hela världen, förväntar jag, att Förenta Nationerna på allt sätt skall medverka till att öka användningen av detta språk, t. ex. genom att rekommendera esperanto som läroämne i skolor, där lärare äro disponibla, och befrämja dess användning inom all samfärdsel, internationell handel och korrespondens.

Denna text har fastställts av IEL och översatts till resp. nationalspråk av de olika esperantoförbunden. Deklarationen har alltså överallt samma innehåll. Endast en person undertecknar varje blankett, som får samma format över hela världen. Listor förekomma sålunda ej. Alla deklamationer sam-

las i London, sorteras, inbindas och överlämnas till FN, vilket skall ske snarast möjligt.

Blanketterna distribueras just nu från Svenska Esperanto-Förbundet, varifrån ytterligare exemplar kunna rekvireras.

Insamla nu namn, så många som möjligt, på alla orter i Sveriges land, på arbetsplatser, i hemmen, hos vänner, bekanta och intresserade i övrigt, kort sagt: överallt.


Och så starta vi den hittills största världsappellen för esperanto, och här måste Sverige hålla sig väl framme.

Skicka in blanketterna efter hand till Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm.

Namninsamlingen avslutas den 15 mars.

Svenska Esperanto-Förbundet.

Utsikt från Bohusgårdens solaltan i Uddevalla. Se sid. 13.



Esperanto al la junularo:

Aktiveco inter la junularo
esperantista en T.J.O.



Ĉiu esperantisto konscias pri la graveco de kontinua kresko de nia anaro dank' al novaj, junaj fortoj. La pioniroj ek de la fruaj jaroj iom post iom laŭnature devas cedi lokon al la nova generacio. En nia lando komenciĝis aktiva laboro por esperanto sur nova kampo pere de t. n. infankursoj en la plej superaj klasoj de la lernejoj, precipe en la popollernejoj. Jam dum la daŭro de la milito tiu laboro ekfloris en kelkaj lokoj, i. a. Stockholm, Göteborg, Borås, Skövde, Motala, Karlskoga kaj Vimmerby. Nun la nombro de la lernejoj kursoj sendube kreskos tre rapide, ĉar inter la svedaj geinstruistoj estas multaj, kiuj favoras esperanton kaj eĉ estas pretaj instrui ĝin al la junularo.

Tutmonde la situacio montras, ke nova generacio devas nun aktive partopreni la rekonstruadon kaj fortigon de la nova, paca mondo. Sekve ĉiu respondeca esperantisto nepre komprenas, ke la postmilita laboro por esperanto devas unuavice celi la junularon — la konstruantojn de la estonta, pli bona socio. Feliĉe ekzistas jam internacia organizo, kies forto estas sufiĉe atentinda. Sole en Anglujo la anaro de TJO (Tutmonda Junular-Organizo) ampleksas 900 membrojn. En Nederlando, Francujo, Belgujo kaj lastatempe ankaŭ en Svedujo tiu ĉi mondorganizo havigas al si gravajn poziciojn. Ankaŭ en aliaj landoj la junulara movado esperantista komencis restariĝon.

La estraro de TJO havas sidejon en Nederlando, de kie oni ankaŭ eldonas la monatan organon "LA JUNA VIVO". Certe multaj svedaj esperantistoj rememoras la interesan, praktikan gazeton, kiu antaŭmilite tre regule alvenis al siaj abonantoj kaj pro sia bona, facila stilo same kiel la tre valora enhavo estis tre ŝatata inter la esperantistoj — eĉ inter tiuj, kiuj jam postlasis la "printempan junecon". Nun denove oni povas aboni LJV-on kaj partopreni la laboron de TJO.

La ĉefperanto de Svedujo, prizorganto de la sveda sekcio de TJO, estas Karl Erik Karlsson, Upplandsgatan 69, 1 tr., Stockholm. Poŝtgiro nro 25 26 74.

Ĝis kiam la perantoj komencis viglan laboron en diversaj lokoj, la ĉefperanto rekte akceptas anoncojn pri membreco kaj jarabonojn je LJV.

Jen la kotizoj: Kr.
Aspirantaj membroj (ĝis 14-jaraj) inkluzive LJV 3:20
Aktivaj membroj (pli aĝaj ol 14 j.) inkluzive LJV 4:00
Subtenantoj (instruistoj, junulargvidantoj, esperantistoj kaj kluboj) inkluzive LJV 4:00

Se oni volas nur aboni (sen membreco) la organon de TJO, ĝi kostas por unu jaro kr. 2:50. "La Juna Vivo" aperas ĉiumonate kaj havos verŝajne jam de januaro 8 paĝojn dank' al la plibonigita papera situacio en Nederlando. Interesaj, belaj, gajaj rakontoj kaj historioj, speciale aranĝitaj kaj por komencantoj kaj por progresintoj, kantnotoj, poemoj, enigmoj, korespondadreso k.t.p. estas publikigataj en LJV, kies tre malalta prezo ebligas abonon ankaŭ inter la plej junaj esperantistoj.

Al ĉiu sveda esperantisto, kiu volas kontribui al plifortigo de la movado, estas direktata varma peto kaj forta alvoko: Fariĝu membro, abonu la gazeton, akceptu la taskon esti peranto en via loko. Skribu al la ĉefperanto laŭ ĉi supra adreso, petu informojn kaj specimenon de LJV!

La laboro inter la junularo estas tiom grava, ke ni absolute ne rajtas neglekti ĝin. Se vi volonte oferas

FN-mötet.

MRS ROOSEVELT ARBETAR FÖR ETT UNIVERSELLT SPRÅK.

Mrs Roosevelt, som nu befinner sig i London, talade den 26 januari på ett soldat-möte och meddelade, att hon skulle söka förmå FN att anta ett universalspråk för världens barn. Mrs Roosevelt påpekade att språkbarriären är ett allvarligt hinder för FN:s syften och arbete. — Jag hoppas kunna, sade hon, framföra i organisationen, att varje barn bör lära sitt eget lands språk och ett överenskommet språk, som skall vara detsamma för hela världen. Hon sade att amerikanerna av naturen är isolationister och manade soldaterna att försöka förstå den övriga världen — annars kommer vi att en gång till få göra vad vi redan gjort två gånger.

KRING ETT UPPSLAG

Den svenska pressen har på framskjuten plats omnämnt mrs Roosevelts meddelande i allmänhet utan kommentarer. Ett par kåsörer ha dock inte kunnat låta bli att ur fack "V: Världsspråk" ta fram och använda dagspressens klassiska skämtrecept, vars idé, som känt, är att låtsas som om det funnes ett stort antal tävlande universella språk. — Världen känner över 200 världsspråksprojekt, men dagspressen vet lika bra som vi, att endast ett enda av alla dessa blivit ett språk. För 60 år sedan var esperanto också bara ett språkprojekt, men i dag är det ett språk, användbart och använt. Det är det sista som skiljer ett språk från ett språkprojekt.

Esperantolitteraturen trotsar med tusentals volymer och hundratals tidningar vem det vara må att kunna uppge någon form av skrift, tal eller sång, där esperanto ej med fördel använts, och vi uppmana enträget kåsörerna att söka ett nytt recept för skämtande i ämnet. Vi våga till och med komma med ett förslag. Tag fast i den mannen, som diskuterar värdet och skönheten hos ett språk, som han inte själv lärt sig, utan bara känner till namnet. Han finns i många exemplar. Hugg honom, innan han åker in i vår med rätta så beundrade svenska dagspress. I fel spalt.

ESPERANTO I SKOLAN.

Till Red. av La Espero.

Förlåt att jag skriver på svenska, men jag har just läst en artikel på svenska i Arbetar-esperantisten, där redaktör Adamsson berättar, hur engelsktalande se på esperanto i skolan.

Han korresponderar med en newzeeländare, folkskollärare Brendon Clark och denne redogör för sina esperantokurser i skolan. "Då undervisningen i esperanto är en god hjälp vid undervisningen i engelsk grammatik och läsning, har inspektören, som märkt detta, inte velat hindra kurserna."

Sedan följer en beskrivning på en gren av undervisningsmetoden. På en engelsk timme få barnen diskutera vad de skulle vilja skriva i ett brev till utlandet. Läraren gör en sammanfattning och ger råd, och så få de små författarna skriva ett brev som engelsk uppsats. — I esperantokursen få de sedan till läxa att översätta denna uppsats och, när de fått dem rättade, få de forma ut dem som brev, vilkas avfärdande läraren därefter ombestyr.

Artikeln slutar med följande.

"Under den tid Clark på detta sätt undervisat esperanto och barnen börjat korrespondera — bl. a. med Sverige — har han kommit underfund med, att det måste bli barnen, som driver fram esperanto, ty man har föga att vänta av regeringarna. När barnen blir intresserade och med esperantos hjälp får förbindelse med andra länder, så intresserar de så småningom

iom de via libera tempo por disvastigo de esperanto inter la gejunuloj, se vi afable tuj partoprenos la laboron, ni komune certe povas atendi bonan rezulton favore al nia lingva movado. Vi estas kore bonvena kiel membro kaj/aŭ abonanto!

"Rivermonto".

Rakonto pri vojaĝo en okupitaj landoj

(Daŭrigo.)

de Ella Nilson.

Sed tiuj varoj, kiuj mankas, ja estas aĉeteblaj en Svedlando, do la danoj ja povas vojaĝi tien? Nu, la demando ne estas tiel simpla, ĉar kiamaniere havigi svedan monon, tio estas grava problemo. En la nigra borso kosta sveda centkrona bileto kvincent (500) danajn kronojn, oni eĉ pagas la duoblan sumon nur por ricevi svedan monon. Sed ne ĉiuj homoj estas tiom bonhavaj. En la butikoj oni estis feliĉa, kiam mi tie ŝanĝis svedan monbileton kaj tie mi ricevis danan monon je duoble pli alta kurzo ol ekz. en la flugstacio de Kastrup.

Ekzistas ankaŭ aliaj problemoj: malabundo de gaso, elektro, hejtaĵo. La familio, kiun mi gastis, uzis antaŭ la milito por sia vilao ducent hektolitrojn da karbo la poŝtare, poste dum la okupado la kvanto malpliigis al tridek kaj malpli. Nun ili ricevos por ĉi tiu vintro nur unu hektolitron kaj duonon da hejtaĵo, sed ne da karbo aŭ ligno, kompreneble nur torfo . . .

La manko de loĝejoj estas katastrofa. Kiam mi estis en Kopenhago kvindek mil 50.000 personoj ne havis loĝejon. Grandan ĉagrenon ankaŭ kaŭzas la amaso da germanaj invalidoj, kiuj apartenas al la rusa zono, sed la rusoj ne deziras ilin. Tiuj invalidoj okupis multajn danajn lernejojn, pro tio la instruado ja ne povas esti kontentiga. La pli aĝaj infanoj ricevas instruon en la antaŭtagmezo, la pli junaj en la posttagmezo.

La kopenhaganoj treege amuziĝas, oni trovas longajn vicojn da homoj antaŭ ĉiuj teatroj kaj kinejoj. Oni devas mendi biletojn almenaŭ unu semajnon antaŭ ĉiu prezentado. Iun vesperon mi estis en la operdomo. Subite aperis en la reĝa loĝio la reĝo kaj la reĝino, kvankam ili nur antaŭ kelkaj vesperoj ĉeestis la saman operon. La reĝo sidis en sia rulseĝo, afable ridetante. Oni komprenas, ke la danoj adoras siajn gereĝojn kaj ankaŭ kronprincino Ingrid ja estas tre populara. La danoj tre fieras pri tio, ke ŝi parolas ilian lingvon sen eĉ plej malgranda fremda prononco.

Kiom ĝojas la dana popolo pro la liberigo el la germana jugo! Sed mi pensas, ke ne ĉiam estis agrablaj momentoj por la germanoj en la okupita Danujo. Jen eta epizodo! En la operdomo prezentigis iu Shakespeare-dramo kaj en iu akto troviĝas la repliko: "La gvidanto estas mortinta!" Ĉe tiu repliko subite eksplodas frenezaj ĝojkrioj. Sed tiuj, kiuj ne ridis, estis la germanaj oficiroj, kiuj aspektis kiel ŝtonaj statuoj. La samo ripe-tigis ĉiuvespere, ĝis la prezentado de la dramo fine estis malpermesita.

Tiuj, kiuj opinias, ke aperis nova trajto en la dana vizaĝo, trajto de seriozeco kaj nealirebleco, verŝajne pravas. Sed oni ŝanĝas opinion ĉeestante la paradon de gardostarantoj sur la placo de Amalienborg, pri kiu la danoj fiere diras, ke ĝi estas la sola loko en Eŭropo, kiun la germanoj ne povis konkeri. Amaso da homoj, junaj, maljunaj, sed ĉiuj ŝajnas gajaj infanoj, kiuj ĝuas la muzikon kaj la vidaĵon de la gardistoj en siaj pompaj uniformoj. Kaj kiam tiuj poste marŝas tra la stratoj, kun longa vosto da homoj post si, en ĉiuj fenestroj kaj pordoj aperas gajaj vizaĝoj, oni kantetas kaj svingas la manojn, en tiu momento oni forgesis la pasinton kaj ĉiujn komplikitajn problemojn.

"Jes", diris iu dano, "oni tiom rapide forgesas". Kaj mi pensas, precipe en tia bela tago, kiam Dannebroggen flirtas kontraŭ blua ĉielo, la fagoj flamas en oro kaj purpuro kaj la rozoj floras ĉe la Sundo. Ŝajnas al mi kvazaŭ promeso pri pli hela, feliĉa tempo.

(daŭrigo.)

LINGVA KOLONO.

POR Ĥ.

En la januara numero de "La Espero" aperis artikolo de nia ŝatata samideano Salex, en kiu li rekomendis la "entombigon" de la litero ĥ. Sed argumentoj por tiu ŝanĝo de nia Fundamento tute mankis.

Kiuj povas esti la kaŭzoj de la malkontenteco pri ĥ? Fonetikaj? Certe ne, ĉar la sono estas multlingva: la germanoj, hispanoj, holandanoj, rusoj k.t.p. posedas ĝin. — Belecaj? Kredeble ne, ĉar nia lingvo eĉ se oni konservas la ĥ-vortojn havas tre multajn "k", kaj ni devas ĝoje akcepti la variecon, kiun ĥ prezentas al ni. — Lingvoteoriaj? Supozeble ne, ĉar oni povas fari nenium proteston kontraŭ la zamenhofa metodo por uzi ĥ. La litero estas ekskluzive uzata en vortgrupo prenita el la greka lingvo. Ĝi respondas en tiuj vortoj al la greka litero X (ĥ en transskribo al nia alfabeto): choros, chimaira, echo, monarchos, teknike k.t.p. La antikvaj grekoj certe elparolis tiun literon "k+h", sed la nunaj grekoj transiris al la elparolo "ĥ". Kaj same kiel ni aprobas la nun-grekan elparolon de ph (= f) kaj skribas "filozofio", "filologo" k. c., ni devas akcepti la sonon "ĥ" en la grekaj vortoj kiuj havas ch. La metodo de Zamenhof estas tre konsekvenca kaj en neniu rilato atakebla.

Laŭ mia opinio ni devas ne ŝanĝi niajn fundamentajn regulojn — kaj al tiuj apartenas sendube la alfabeto — sen tre fortaj motivoj. Ŝajnas al mi, ke tiaj mankas en la nomita kazo. Ni tial gardu niajn ĥ-vortojn kaj ŝatu la lingvan variecon de ili prezentatan. La kontraŭa metodo ŝanĝema kondukus, mi timas, al — ĥaoso!

Ebbe Vilborg.

PRO LA ARTIKOLO DE SALEX.

Nia juna amiko Salex faris ŝercon en la lasta numero per siaj "Batalpometoj". Lia celo sendube estis admoni la nuntempajn esperantistojn, ke ili bone studu la historion de esperanto. El tiu historio nome ili lernas,

ke esperanto, estinte dum la unuaj sep jaroj projekto de lingvo internacia, per la voĉdonado en 1894 estis levita en la rangon de lingvo: la vivanta lingvo de la esperantistaro, kiu akceptis ĝin en sensanĝa kaj sensanĝinda stato;

ke Zamenhof rezignis ĉian rajton super la lingvo.

Tio signifas ke la esperantista popolo do sola prenis sur sin la respondecon pri la lingvo, kion ĝi povas efektiviĝi nur per disciplino kaj unueco.

La unua universala kongreso de esperanto en Bulonjo en 1905 sankciis la Fundamenton de Esperanto, kontrakto, kiu estas la sola konstitucia leĝo de la esperantistaro.

La unua kongreso ankaŭ fondis, laŭ la konsilo de Zamenhof, la Lingvan Komitaton, kies estraro fariĝis en 1908 la Akademio de esperanto, "por zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion".

La Akademio — tiel tekstas la fonda deklaro de la Akademio — devas unue malhelpi rompon de la fundamentaj gramatikaj reguloj kaj malrespekton de la fundamenta vortaro; due ĝi devas zorgi, por ke la evoluado de la lingvo fariĝu laŭ la principoj, reguloj kaj instrukcioj entenataj en la fundamentaj dokumentoj.

"Esperanto ne estas ia speco de ludilo kiun iu lernanto rajtas (aŭ povas) ŝanĝi laŭ sia kaprico . . ." Tiuj ĉi vortoj de Salex estas la plena vero. Komentarioj estas nebezonaĵoj.

Paul Nylén

Akademiano, sola postvivanto el la origina elekto.

föräldrarna. Även andra barn bli intresserade och ber att få lära esperanto. Även andra lärare har blivit intresserade, då de sett de vackra kort, som esperantokunniga barn fått från utlandet. Det ligger något i Clarks synpunkter. Kan man bara få barnen intresserade, så blir de verkligt pådrivande agitatorer för språket, och de som en dag kommer att fälla utslaget".

Jag har velat fästa redaktörens uppmärksamhet på

denna artikel därför att det är ju samma sak som så ivrigt diskuterades på SEF:s årsmöte i Stockholm, och måste därför vara av intresse för Esperos läsekrets.

Jag anslöt mig livligt till de förhoppningar som uttalades på stockholmsmötet om blivande barnkurser med SEF:s understöd och jag motser med spänning förbundets nästa årsberättelse, för att få veta hur långt man hos oss har hunnit.

V e n.

LINGVA KOLONO (daŭr).

TEKNIKAJ TERMINAROJ

en esperanto estas nepra kondiĉo por apliko de nia lingvo en diversaj fakoj. Se ili ankoraŭ ne ekzistas ni devas krei ilin. La entrepreno de IEL ĉiujare eldoni novan fakterminaron kiel aldonon al la jarlibro estas laŭdinda. Jam aperis aeronaŭtika, arma, infanluda, muzika kaj radia terminaroj. (Eld. Soc. Esperanto, Fack 19071, Sthlm, prezo 1.— kr. La plej bona maniero estas aliĝi kiel MA de IEL! Tiuj terminaroj ne estas iom internaciaj kiom oni povus deziri, ar ili ja aperis dum la milito. Ili tamen ne celas oficialaj sed volas praktike servi al esperantistoj.

Mi provas krei kartaron de fakterminoj en esperanto kun sveda traduko kaj poste eble kompili vortarojn. Por tio mi ĉerpos el haveblaj fakterminaroj: Plena Vortaro, Maŝinfaka Vortaro de Wüster, la IEL-terminaroj kaj aliaj. Jam mi preskaŭ tradukis la radioterminaron, kaj inĝeniero Bertil Magnellsson, Deje, promesis helpi. Tiamaniere per helpo de fakuloj mi esperas iom post iom povi riĉigi la kartaron. Terminaroj de ekzemple kemio, matematiko, elektrotekniko estas tre dezirindaj. Pri elektrotekniko jam ekzistas elektroteknika vortaro de Internacia Elektroteknika Komisiono, kiu ankaŭ enhavas esperanton krom kvin aliajn lingvojn.

En 1939 la dua brazila inĝeniera kunveno decidis uzi esperanton apud kvin aliaj lingvoj en teknika vortaro, por kies pretigo oni intencis elekti komitaton. Mi ne aŭdis ion pri la rezulto.

MASO KAJ PEZO.

Por la grandoj maso kaj pezo oni ĝis nun plej ofte en la praktiko uzis la saman nomon de unuo, kilogramo (kg.). Ĉar tio kaŭzas konfuzon en la mezursistemo la sveda Monera kaj ĝustiga instituto (Kungliga Mynt- och justeringsverket) kunvokis al kunveno por diskuti metoden eviti la dilemon. Tiam oni interkonsentis ke kilogramo estu unuo por maso (laŭ la sveda leĝo) kaj ke la koresponda unuo por pezo ricevu la nomon kilopondo (kp). Forto de 1 kp donas al maso de 1 kg la normalan akcelon 9,80665 m/s². Per tia difino oni ricevas fort-unuon kiu estas konstanta sur la tuta tero. Pro la tera rotacio la pezoforto estas malsama sur diversaj lokoj de la tero kaj plej granda ĉe la polusoj.

Oni ankaŭ rekomendis la mks-sistemon (metro-kilogramo-sekundo) de mezurunuoj, kie ekzemple forto havas la unuon 1 newton (1 n). La forto 1 n donas al la maso 1 kg la akcelon 1 m/s², do 1 kp = 9,80665 n. Salex.

Naskiĝis

filo Urban al Inga kaj Sigvard Håkansson, Stockholm. Ni kore gratulas.

MALGRANDA REVUO.

Nro 1 1946 aperos meze de februaro. Prezo 1 kr. Abono por 1946 (4 kr.) akceptata.

Obs! Restantaj ekz. de nro 1 1943 kaj nroj 2, 3, 4 1944 estas vendataj por po 0,55 kr., inkluzive afrankon.

Legajo tre taŭga ankaŭ en daŭrigaj kursoj. S. Engholm, Skolg. 9, Ludvika. P&k. 26 80 23.

Donacpakajoj.

Donacpakajoj al Polujo kaj Nederlando. Nun temas pri Aŭstrujo.

Nia alvoko en la novembra kaj decembra numeroj de nia gazeto pri pakajdonacoj al Polujo kaj Nederlando ricevis bonvolan akcepton de la sveda esperantistaro. Ne malpli ol 150 personoj obeis sian koron kaj sendis monon aŭ pakajojn kun vestaĵoj aŭ manĝaĵoj. Se oni konsideras, ke multloke la Esperanto-grupoj post kolektado inter siaj membroj sendis siajn pakajojn, oni preskaŭ povas fieri pri la rezulto. Ĉar evidente almenaŭ la duono de la membroj de SEF partoprenis la helpagadon. Tio estas des pli rimarkinda, ĉar antaŭe, dum la milito, preskaŭ ĉiu sveda familio jam plurfoje faris donacojn por suferantaj popoloj.

Ĉiuj donacoj, ricevataj de SEF, estas nun senditaj: la duono al Nederlando kaj la duono al Polujo. Ni petas pardonon al niaj nederlandaj kaj polaj amikoj, se ili kelkfoje inter la donacoj trovas malnovajn, multe uzitajn vestaĵojn. Ni certe faris nian plejblon, kaj novajn vestaĵojn ni ja ne rajtas sendi laŭ la sveda leĝo. Bonvolu konsideri, ke ĉiu peceto estas donita el varma koro kaj en la sento, ke vi eble povos iel uzi ankaŭ sufiĉe eluzitajn varojn.

Nova alvoko!

Montriĝis, ke la kolektita mono ne plene sufiĉas por kovri la transportkostojn. Tial ni petas vin, ke vi ankoraŭ unufoje bonvolu pripensi, ĉu vi ne havas eblecon fari malgrandan mondonaco!

Krom tion ni povas informi vin, ke ni ĵus el Aŭstrujo ricevis kelkajn listojn pri esperantistaj familioj kun infanoj. Vi certe legis en la gazetaro, kiom suferas la homoj kaj speciale la infanoj en Wien. Tial SEF decidis iniciati al sendado de manĝopakaĵoj al tiu suferanta urbo. Ĉiu pakajo kostas 25 kr. Sed kompreneble ankaŭ malpli grandaj sumoj estas bonvenaj, ĉar "multaj riveretoj formas kune grandan riveregon". Bonvolu do dum la venontaj kunsidoj de la Esperanto-grupoj kolekti monon por tiu celo, kaj sendu ĉion al SEF. Nun do temas nur pri mondonacoj, ĉar la pakajojn ni mendos kaj distribuos el Stockholm. La duono de la membroj de SEF, kiuj antaŭe ne havis eblecon partopreni nian helpagadon, bonvolu nun kapti sian ŝancon!

Interpopola frateco.

Kortuŝitaj niaj eksterlandaj amikoj ricevis la pakajojn. Kaj kortuŝe estas legi iliajn leterojn, plenajn je dankemo. Ni sentas ambaŭflanke veran fratecon inter ni. Ni sentas, ke ni sen ia oratoraj frazoj kunhelpas realigi la celon de Esperanto:

Formado de interpopola frateco.

Sveda Esperanto-Federacio
La prezidanto.

IOGT LA UNUA.

Stockholm havos venontan someron sian unuan internacian kongreson post la milito. La bontemplanoj en Svedlando nome promesis aranĝi la unuan mondkongreson de IOGT post la alveno de la paco. Gastoj el la plej multaj eŭropaj landoj kaj el Usono estas atendataj al tiu unika okazantaĵo en nia ĉefurbo. La svedaj esperantistoj atendas, ke iliaj organizoj kaptos la okazon serĉi kontakton kun la kongreso kaj pripensos la eblecojn esti utilaj dum tiu kongreso.

EDVIN FALCK, 50-jara.

La 18-an de febr. s-ro Edvin Falck, Lund, solenas sian 50-jaran naskiĝtagon. En la jaro 1935 li komencis lerni Esperanton en la kurso de T. Edberg.. La saman jaron li aliĝis al la Esp. Klubo de Lund. En la klubo li aktive laboris, kaj li funkciis kiel prez. kaj v.prez. kaj nuntempe estas kasisto. Krom tio li dum longa tempo prizorgis la presadon de la kluba gazeto "Nia Stelo". La esperantistoj deziras alporti al li la plej korajn salutojn okaze de la festotago. N. P.

Uddevalla.

PENTEKOSTAJ TAGOJ EN UDDEVALLA.

Rapide la tagoj marŝas. La tero ekster mia fenestro estas kovrita de neĝo, kaj la infanoj glitkuras sur la lageto, sed la ĉielo bluiĝis, la suno rampas sur la firmamenton. La almanako montras la 22-an de januaro. Mi konstatas, ke jam unu tuta monato forflugis. Miaj pensoj haltas ĉe la granda festo de la svedaj esperantistoj: Pentekosto. Tiam ni kolektiĝos por aktiviĝi pere de la Sankta Spirito, kiun kreas la ideo, kiam samideanoj estas kune.

Ni kunvenos en Uddevalla. Rigardu la geografian karton, se vi ne klare memoras la sciojn de la lernejo. La kongresurbo de 1946 estas idilio, sed tamen ne forgesita urbeto kun dormantaj princinoj. La princinoj estas multaj, sed ili laboras en industrioj, kiuj donas al la urbo viglan impreson. La 20.000 enloĝantoj estas modernaj homoj, kiuj celas al evoluo.

Multaj eksteruddevallaanoj kredas, ke Bohuslän estas mara kaj roka, ke la homoj nur manĝas fiŝojn kaj hakas graniton. Tiu kredo estas unuflanka, kaj Uddevalla estas bona ekzemplo pri la varia naturo, kiun nia provinco havas. Ĉiuj, kiuj venas al Uddevalla, fartas bone, kaj la turista torento ĉiujare plilarĝiĝas.

La unuan fojon la svedaj esperantistoj jarkunvenos ĉi tie, kaj la urba konsilantaro bonvensalutis la kongresanojn, donante 500 kronojn al la organiza komitato. Kaj ni atendas, ke kaj en- kaj eksterlandaj esperantistoj grandamase venos al Uddevalla pentekoste.

Ni faros ĉion eblan, por ke vi fartu bone. Ni ne ŝparos la fortojn, kaj nun dependos de vi, samideanoj, kiel ni sukcesos. Do, preparante por someraj tagoj, ne forgesu la Pentekoston en Uddevalla. Ni faru ĉiĵaran kongreson de nia Federacio la plej impona el ĉiuj. Kune ni atingos tiun rezulton. Venu multope kaj aliĝu frue, por ke ni povu akcepti vin kiel eble plej bone.

Einar Dahl.

Orquideas Catarinenses. Kap. Antonio de Lara Ribas, konata ĉasisto kaj kulturisto de orkideoj en la Stato Sankta Katerino, faris en kajero kun ĉisupra titolo interesan studadon pri la diversaj specoj de tiuj ornamaj floroj ekzistantaj en tiu ĉi Brazilia provinco.

S-ro Lourival Câmara, ĝenerala Direktoro de Departamento Estadual de Estatística (Ŝtata Departemento pri Statistiko) komisiis al Esperantista klubo de Florianopolis la disvastigadon de tiu ĉi eldonaĵo inter la Esperantistaron. Tiu ĉi klubo (adreso: Rua A'lvares de Carvalho, 59, Florianópolis, Brazilo), bonvole sendos ekzempleron al samideanoj kiuj ĝin petos.

NACKA hobbyklubb kan möta upp vid ett mönstringsmöte med ett 70-tal medlemmar. Då man träffades i december hann man med fem föredrag om olika hobbies och dessutom flera musikhobbyisters medverkan.

Oss intresserar särskilt notisen, att kandidat Sture Nilsson vid mönstringsmötet talade om esperanto, som gör det möjligt för hobbyfolket i hela världen att komma i förbindelse med varandra.

RADIO.

SKÖVDE—PRAG. Förra veckan blev Skövde anropat från Prags radio under esperantoutsändningen och hälsningar framfördes till den svenska stadens esperantister. Man meddelade också att den nu tysta radiostationen Brno skall åter träda i funktion om några månader. På nytt kunna vi alltså hoppas på radiopjäser och opera på esperanto.

Skövde-esperantisterna höllo den 28 januari årsmöten med sina organisationer och beslöt då bl. a. svarskrivelse till Prags radio.

Under hänvisning till radioprogrammen i januari-

Ĉu ni ankaŭ malamam la infanojn?

Pro la politiko kaj la kruelaĵoj per kiuj Hitler kaj la aliaj nazistoj provis "beni" kaj feliĉigi la mondon, la malamam kontraŭ ĉio germana ege kreskis. Kaj ne estas strange, se la turmentitaj homoj sentas emon "iel" venĝi. Sed, ĉu ni pro la krimoj de la nazistoj ankaŭ punu kaj malamam la germanajn infanojn? Ili ne povas helpi, ke ili estas naskitaj de germanaj gepatroj. Ĉar neniun infano "mem" havas la eblecon elekti kaj selekti la gepatrojn!

Troviĝas homoj nuntempe, kiuj per ĉiuj rimedoj provas neniigi la germanan popolon. Jes, ĉiel oni malhelpu al ĝi refortikiĝi post la malglora malvenko. Oni celas malebligi al la germanoj komenci iun novan militon. Kaj tiam agadon ĉiu vera pacamanto ja salutas kun ĝojo, sed pro tio ni ne forgesu, ke ne ĉiuj rimedoj estas permesataj . . . eĉ ne en militoj! Des malpli en tempo, kiam ni rekonstruu tion, kion la milito detruis!

Ni do tute ne turnu nian malamam al la senkulpaj infanoj, kiuj en la nuna Germanujo vivas mizeran kaj senesperan vivon inter la ruinoj de la antaŭa centro por la nazistoj. Ankaŭ al tiuj infanoj ni sendu helpon. Krome ni ne forgesu, ke certe ankaŭ inter la germanoj ankoraŭ troviĝas granda nombro da homoj, kun kiuj ni certe povus simpatii! Se ni eventuale renkontiĝus kun ili. Kompreneble mi nun ne pensas pri tiuj germanoj kiuj libervole aliĝis, kaj apartenis al la nazistaj organizoj kaj kiuj aktive partoprenis la "hombuĉadon", ĉu per venenado al senkulpaj homoj en "gasĉambroj" ĉu per aliaj same kruelaj metodoj. Al tiaj germanoj ni ne povas senti simpatian, sed male abomenon!

Sed mi ne volas kredi, ke ĉiuj germanoj estas tiel kruelaj kaj senkonsciencaj, kiel la nazistoj. Sendube ankaŭ troviĝas germanoj, kiuj havas la koron en la "ĝusta" loko! Kaj pro ili, ni ne malamam la tutan germanan popolon! Ni esperu, ke ĝuste tiuj personoj ricevos la komision rekonstrui la novan germanan regnon, kun kiu ĉiu alia nacio povos amike interrilati.

Dum kaj post la milito la svedoj montris grandan helpemon ne nur al eksterlandaj infanoj, sed ankaŭ al maljunuloj. Diversmaniere la svedoj provis mildigi la suferojn de la militintaj popoloj. Kaj ne sen sukceso! Tion montras interalie la multnombraj dankleteroj el la eksterlando. Tio spronu nin pluiri sur la sama vojo, sed en tia okazo ni ankaŭ sendu helpon al la germanoj! Eble ne ĉiuj svedoj ŝatos tian helpagadon, sed verŝajne kelkaj aŭdigos kritikon, sed inter tiuj ne estu ni esperantistoj! Ni montru, ke ni estas pli klarvidaj kaj homecaj . . . Estas home senti malamam pro iu maljustaĵo, kiun oni faras al ni, sed ĉu ne estas pli home montri pardonemon? Sufiĉe da malamam jam regas en la mondo por ke oni ne provu forigi kaj mildigi ĝin!

Jes, ni esperantistoj montru al la mondo, ke ni lernis ion pere de nia esperantisteco, nome, ke troviĝas bonaj kaj malbonaj homoj en ĉiuj landoj kaj raso. Ni ne kondamnu eĉ la germanojn antaŭ ol ni unue esploris, ĉu ili vere estas krimuloj . . . Pere de esperanto ni havas eblecon paroli al la germanoj en lingvo, kiun ankaŭ ili komprenas! Se iu el la germanaj esperantistoj kondutis malbone, ni montru al li, ke lia ĉeesto ne plu estas dezirata en niaj rondoj. Sed alie, ankaŭ la germanoj estu bonvenaj, ĉu ne?

Mi volas fini ĉi tiun artikolon citante kelkajn frazojn el la libro "La Granda Aventuro" verkita de F. Szilágyi — — — "Punu la verajn kulpulojn, sendanĝerigu ilin, sed ne venĝu kaj ne laŭ nomoj. Ne serĉu nomojn, nek tiujn de la aliaj, de kiuj la malbeno venis. La venĝo senhonorigas ne nur la kaŭzanton de la venĝo, sed ankaŭ la rajtan venĝanton. La venĝo konas nur nomojn kaj ne homojn. Kaj por la homa digno de la estonta generacio, rigardu la homojn kaj ne la nomojn!"

Einar Hult.

numret meddelas, att Prag sänder måndagar och torsdagar kl. 22.50. MT & våglängd 450—470.

Lausanne: dissendo marde 20.2.46 19.25 MT. Petu ĉe Radio-Studio, Lausanne, Schweiz, regulan esperantan radiosendon pere de poŝtkarto.

LITERATURO.

LA SOVAGA ROZO estas la organo de l' anoj de la Jursla-kursoj. Multenhava. La ĉefenhavo tamen estas la klasika radiodramo "Legu aŭ pafu?" (maksimume 3 personoj).

La dramo estas havebla ĉe Familio Szilágyi, 3:e Viĵlagatan 26, Borås, aŭ ĉe Nils Johansson, Karlshovsvägen 46, Norrköping, kontraŭ po 40 oeroj (aŭ 1 respondkupono). Bona literaturo por kursoj.

HERALDUS REDIVIVUS.

Responde al multaj demandoj, s-ro Teo Jung petas nin komuniki, ke jam de ok monatoj li estas klopodanta pri reeldono de Heroldo de Esperanto, kiu estis antaŭ la milito la semajna internacia organo de la Esperantomovado. Fine li sukcesis aranĝi ke la unua postmilita numero povos aperi, post nelonge, kun 8 grandaj paĝoj, en la tradicia por ĝi impresa taggazeta formato. En la jaroj 1920—1940 aperis entute 1049 numeroj de Heroldo; la 1050-a numero estis ĵus kompostita kiam la invado de la Hitler-armeoj en Nederlando kaj Belgiojn malebligis ĝian aperon.

La abonprezo de Heroldo por 1946 estas egala al la MA-kotizo de IEL. Por Svedujo ĝi estas 9:— kronoj. Subtenantaj abonantoj, t. e. abonantoj kiuj per speciala kotizo volas subteni la entreprenon, pagas sumon egalan al MS-kotizo de IEL (svedoj 18:— kronojn). Heroldo-Patronoj pagas sumon egalan al Patrono-kotizo de IEL (svedoj 90:— kronojn).

En Svedujo oni povas pagi la abonkotizon por Heroldo de Esperanto al la poŝtĉekkonto Stockholm n-ro 4180, je la nomo de "Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando".

Danaj specoj de Alternaria kaj Stemphylium. Taksonomio. Parazitismo. Ekonomia signifo. Den danska doktorsavhandlingen, vars namn här är översatt på esperanto, har Paul Neergaard till författare och har utgivits på engelska i serien Meddelanden från J. E. Ohlsens Enkes växtpatologiska laboratorium i Köpenhamn. Den ståtliga volymen håller 560 sidor, och anledningen att vi sysselsätta oss med den här är, att den — liksom övriga verk från samma laboratorium — innehåller en fyllig resumé på esperanto. Inledningsvis meddelas att studiematerialet är en viss grupp mikroskopiska svampar med relativ vikt ur växtpatologisk synpunkt, och vi få sedan följa undersökningsmetoderna och klassifikationen samt redogörelsen för de av dessa svampar alstrade sjukdomarna och deras bekämpande. En del nya tekniska termer ha tillkommit. Författaren utlovar att lingvistiskt behandla dessa i laboratoriets nästa årsbok.

10. Aarsberetning fr J. E. Ohlsens Enkes plantepatologiske laboratorium åtföljes i år utom av esperantoresumé även av en 10-årsförteckning över publicerade rapporter. Denna avslutas med den esperantistiska "Terminologia listo", som utlovats i ovan anmälda avhandling.

RICEVITAJ GAZETOJ.

RENOVIGO, dulingva revolucia gazeto, venis kun januar-nro el Meksiko.

PER UNU VOCO, organo de la laborista esperanto kunularo, Johannesburg, Syd-Afrika, nr 23 och 24, nov-kaj dec-nroj 1945.

IRLANDO VOKAS, telegrambyråbladet på esperanto från Dublin, har fått över sitt decemhernummer. Dess nyheter äro nu en smula gamla, men de innehålla ett par adresser, som ännu äro värdefulla.

Den ena är "Fotografiska Societo de Irlando, Sraid Hiun 11, Dublin, dit varje fotoklubb kan skriva för att få programmet för den internationella fotografiutställning, som skall öppnas i Dublins Stadshus i april i år.

Den andra adressen är: "An t'Iolar Sraid an Phiar-saigh 13, Dublin." Dit inbjudes envar att sända 1 svars-

kupong och begära tidningshäftet för den 19/10 45 med ett rikt bildgalleri från den egenartade och hittills största hyllning Irland ägnat någon av sina söner, kardinalen Josef Mac Rosy, ärkebiskop av Armagh och hela Irland.

ESPERANTOBLADET, Norvega Esperantisto, avtackar i novembernumret 1945 sin förutvarande redaktör Liv Sandberg. Det är ordföranden i NEL som för pennan och berättar om hennes tioåriga redaktörskap. Den nye redaktören, herr Alf Hasle, presenterar sig själv och lägger upp sitt program kring en skylt i ett butiksfönster "Se vi havas stofon, ni kudros por v' elegantan robon aŭ mantelon aŭ ĉapelon".

LA VERDA FLAMO, oficiala organo de Maroka Esperanto-Asocio nro 12/1945.

ESPERANTO INTERNACIA, oficiala organo de IEL, nro 1/1946, 16-paĝa kajero, tre enhavoriĉa. Inter alie ĝi sciigas pri starigado de Hamburga Esperanto-Societo sub gvido de Oscar Bünemann kaj Herman Teobald. Bedaŭrinde oni ne diras la adreson de la societo. Grava scienca artikolo pri La atoma bombo en la kajero estas notinda.

ESPERANTO, Internacia Revuo, eldonata de UEA jan-feb-nroj 1946. La gvidartikolo akcentas la malsimilecon inter la militfino 1918 kaj tiu de 1945: UEA deklaras sin preta ekzameni seriozan proponon pri novarango de la internacia organizo de la esperantomovado. Raporto pri la laboro de UEA dum la milita tempo sekvas kaj anonco pri tute nova servo de UEA sub la titolo Kie estas kiu? servo de reserĉado.

GLOBAL THINKING är ett prydligt litet häfte, som på engelska och esperanto publicerar artiklar, vilka ge uttryck för behovet av ett världsmedvetande, för förståelse utan fördomar av andra nationers uppfattningar. Häftet utges från: 43 21 Fourth Avenue, Detroit 1, USA, och kostar 2 svarskuponger pr häfte.

INSTRUISTOJ ATENTU!

Utdrag ur Allmänna Poststadgan.

§ 24. Under förutsättning att försändningen sker genom förmedling av vederbörande skolföreståndare, må efter taxan för affärshandlingar befordras även försändelser, innehållande brev och andra skriftliga meddelanden, som utväxlas mellan skolelever, även om denna korrespondens har karaktären av verklig och personlig skriftväxling.

Försändelse av det slag, som i denna paragraf omförmäles, skall vara försedd med anteckningen "Affärshandlingar" samt är i avseende å form och yttre beskaffenhet underkastad samma föreskrifter, som gälla för trycksaker. Vikten för varje försändelse får icke överstiga 1 kilogram i den inrikes utväxlingen och 2 kilogram i förbindelse med utlandet.

Befordringsavgiften för inrikes korsband, som innehåller affärshandlingar, utgår för varje viktsats av 100 gram eller del därav med 5 öre. Minsta avgiften utgör emellertid i fråga om lokalförsändelse 10 öre och i annat fall 20 öre.

För befordran till utlandet av korsband, innehållande affärshandlingar, utgör avgiften 5 öre för varje viktsats av 50 gram eller del därav. Minsta avgift för varje försändelse utgör emellertid till Danmark, Finland, Island eller Norge 20 öre och till övriga utlandet 30 öre.

Anmälan till examensskrivningen den 17 mars skall göras senast den 5 mars.

SEIF Kolono

Koresponda Centro

donas jenan konsilon al korespondemaj samideanoj: SVEDOJ sendu leteron en afrankita koverto (aŭ nur poŝtkarton) sen adreso al ni, menciante la deziron rilate landon kaj serĉatan amikon. Por ŝpari afrankon pluraj povas komune sendi tiajn leterojn en unu koverto al SEF (sed ĉiu letero en propra, afrankita koverto!) Vidu plue specialan artikolon sub la rubriko "Instruistoj atentu!" p. 14.

Eksterlandanoj

sendu nur sian adreson sur karto menciante la deziron rilate korespond-amikon. Ĉiuj skribu sian nomon kaj adreson tre klare kaj ĉiam preslitere. Adreso: **Koresponda Centro, Sveda Esperanto Federacio, Tegelbacken, Stockholm C, Svedio.**

Reklam-afiŝoj.

Ankoraŭ restas ĉe ni certa kvanto de la bela afiŝo, kiun ĉiu klubo ricevis por la esperanto-semajno pasinta aŭtune. Ĉu iu el vi volus helpi nin distribui la restaĵon en lokoj aŭ urboj, kie nun ne estas esperantistoj aŭ nur malforta klubeto? Ekzemple en la regionoj Gotland, Halland, Uppland, Värmland, Östergötland kaj Norrland.

Por doni konkretan ekzemplan, ni volus konsili al la membroj de La Aglo en Karlskoga fari ekskurson al Kristinehamn iun dimanĉon kaj tie elmeti certan kvanton de la afiŝoj. Certe multaj aliaj kluboj kaj izolaj membroj povus agi simile provante verdigi "blankajn" lokojn en la najbareco.

Esperanto-alumeto 1945 kaj 1946.

Ni esperas ke ĉiuj nun ricevis (vendis kaj pagis) menditajn alumetojn. Se ankoraŭ estas membroj, kiuj ne mendis, ili faru tion tuj, ĉar nun restas nur ĉ. 1000 skatoloj ĉe ni. La prezo estas 4:— kr. po 100, sed ni preferas mendojn de minimume 200, ĉar la afranko kostas al ni tro multe je sendo de nur 100 al unu persono.

Nova etikedo por la Alumeto 1946 dezirata. Certe estas iu inter niaj membroj, kiu scias la arton desegni belan kaj allogan etiketon en du koloroj. Provu tuj kaj sendu vian proponon al ni. Ni intencas komenci la novan vendadon jam en la fino de marto.

Nova esperantosocieto


fondiĝis en Ludvika kaj aliĝis al SEF. Prezidanto estas Stellan Engholm. La federacio salutas ilin kore bonvenaj. Östersund informis nin, ke ili intencas fondi novan societeton el la partoprenantoj de iliaj kursoj. Ni deziras bonan sukceson ne nur al ili, sed al ĉiuj kursoj, kiuj komprenas la valoron de societo aliĝinta al Sveda Esperanto-Federacio kaj ni atendas multajn tiajn bonajn signojn dum 1946 — la rekorda jaro.

Amikaro de SEF

ricevis du novajn membrojn komence de januaro: Malmö Esperantoförening kaj s-ron Nils Olsson, Höör. SEF danke bonvenigas ilin kaj esperas ke pluraj sekvos. La kotizo daŭre estas nur 5:— kr. pomonate kaj la celo tutsimple: Havigi ekonomian spinon al SEF por ke ĝi povu disvastigi esperanton tiel ke vi ĉiuj povos havi utilon de ĝi!

S a m.

Skattnästaren meddelar, att den 24 januari i år redan inbetalats avgifter från 153 enskilda medlemmar (mot 154 under hela år 1945). Snabbheten bör ge dröjare, ävensom klubbkassörer en tankeställare.



Meddelande från Esperanto-Institutet

Examens-skrivning 17 mars.

De många esperanto-kurserna i landet bör föranleda många examina i år. Anmäl deltagande före den 5 mars.

Somera Universitato 10—16 juni.

Planera redan nu Er sommarledighet så, att Ni kan delta i antingen sommaruniversitetet i Uddevalla eller i

Jursla-kursen 14—20 juli.

Denna Esperantisternas Semestervecka har sedan några år tillbaka samlat allt flera deltagare. Förra året deltog 45 personer. Fler kan tyvärr ej få plats, varför det gäller att anmäla sig i tid.

Institutets årsmöte.

Söndagen den 6 jan. höll institutet årsmöte. Årsberättelsen utvisade, att under 1945 avlagts 2 högre och 21 lägre examina. Esperanta Studservo hade förra studieåret samlat 200 deltagare. Om sommaren semesterkurser har denna tidning redan infört detaljerade artiklar. I institutets direktion omvaldes bibliotekarie Sam Owen Jansson.

UPPROP TILL SVERIGES ESPERANTISTER!

I samband med att brevväxlingen med utlandet kommer i gång bör varje svensk esperantist beställa den nyutkomna speciella trycksaken "Al mia korespondant(in)o". Just nu är det viktigt, att denna trycksak kan medsändas till varje korrespondent, ny eller gammal, i främmande land. Trycksaken erhålles kostnadsfritt i önskat antal exemplar. Ett exemplar bör gå med till varje korrespondent.

Observera! Det är synnerligen angeläget, att inte ett enda esperantobrev lämnar Sverige under den närmaste framtiden, utan att denna trycksak finnes bilagd.

Skriv genast till

Svenska Esperanto-Institutet
Tegelbacken, Stockholm.

SVEDA KRONIKO

La Aglo, KARLSKOGA. Från och med november har klubben egen lokal vid Karlskoga torg med ingång från Urbrinken. Klubben håller där sina ordinarie möten första och tredje torsdagen i varje månad kl. 20. Måndagar hålles fortsättningskurs, tisdagar nybörjarkurs, onsdagar har ungdomsklubben (La Aglidoj) sina möten och varannan torsdag hålles konversationscirkel. Dessutom är anordnade kurser i folkskolan och Bofors Ungdomsgård. 110 elever deltagar i kurserna.


Klubben har av Staden samt föreningar i staden erhållit såsom ekonomiska bidrag till klubbens verksamhet anslag å 1.000 resp. 190 kronor.

Klubben har gjort en insamling för de ungerska internerna vid Loka, vilket inbringade en summa av 420:— kr. Dessutom har klubben haft en klädinsamling för Finland.

MOTALA. Dimanĉe la 20-an de jan. Motala Esperantoklubo invitis siajn membrojn kaj samideanojn el diversaj lokoj el Ostgotio al kunveno en la ejo ABF. Post salutaj vortoj de la kluba prezidanto A. Seger la angla samideano Fred Turner el Linköping faris tre interesan paroladon pri la temo "La estonteco de la esperanto-movado". Li unue menciis pri la stato de nia movado antaŭ la lasta milito kaj montris, ke la bezono de internacia helplingvo nuntempe estas pli aktuala ol

Krucvortenigmo

kombinita de K. J. Moberg.



HORIZONTALALE:

1. Taŭga pripensita procedaro por plej bone atingi difinitan celon.
8. Plirapidigi, plifruigi.
9. Greno, el kiu oni faras grizan farunon.
10. Estre esprimi al iu sian volon, ke li faru ion.
11. Granda akvo.
12. Orkestra peco, ludata antaŭ opero.
14. Kolego, samokupulo.
16. Disjeti grajnoj sur tero por ke ili ĝermu kaj kresku.
18. Devigi iun foriri el sia patrujo, malpermesante, ke li tien revenu.
20. Akvo en solida formo.
21. Solena arma revuo.
22. Honora entuziasma amasa akcepto al iu.

VERTIKALE:

2. Havanta nenium finon.
3. Sama kiel 22 horizontala.
4. Facile uzebla: ne laciga; bone adaptita al sia destino.
5. Manĝaĵo farita el bakita faruno.
6. Plenumu vian servon!
7. Batalo per armiloj kontraŭ fremdlandaj armeoj.
13. Scienco pritraktanta la devenon de la moroj kaj de la moralo.
14. Patkuko.
15. Taksi kaj difini grandecon, kvanton, gradon de io.
16. Necivilizita, ne hejmita, ne kulturita.
17. Batalo per armiloj.
19. Metiaj instrumentoj.

Antaŭ la 20a de feb ensendu viajn solvojn, kaj la du plej bonaj estos premiataj.

iam antaŭe dank al la rapida evoluo de la tekniko dum la milito, kiu forigis la limojn de la nacioj kaj ebligis pli viglan interrilaton kun homoj el aliaj nacioj. La parolanto ankaŭ montris, ke la grandaj translokigoj de homoj el unu lando al alia evidentigis la lingvan konfuzon. Turner ankaŭ pritraktis la rolon de nia movado en la paca laboro: forigi la malamon kaj miskomprenon, kiuj estis dissemataj dum la milito. Li alvokis ĉiujn samideanojn partopreni en tiu laboro.

Post la parolado oni prezentis amuzan parton de la programo, kiu konsistis el montrado de kelkaj belaj kaj instruaj filmoj, sorĉa prezentado, demanda sporto, leteraŭkcio, muziko ktp.

La kunveno, kiu estis vizitata de 50-o da gesamideanoj, donis la impreson, ke la intereso por nia movado estas vigla ĉi tie, pro kio ni esperas bonan laboron estonte.

Z - a n o.

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Postfack 19071, Stockholm 19.

Redaktör: Eva Julin, Nytorngsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98. Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:35.

Utkommer en gång i månaden.

Annonpris: 20 ore pr mm. Korrespondensannonser: 1:50.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 515 11.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO — IEL.

Ĉefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88.

Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:50, Membro-Abonanto 9:—; Membro-Subtenanto 18:—; Patrono 90:—.

Redigeringen av nummer 3 avslutas den 20 februari.

KORESPONDADO.

S-ro Kiril T. Kirev, vil. Opalcenec, Ĉirpansko, Bulgarujo, organizanto de agrikultura kooperativo, deziras korespondi kaj petas pri adresoj aperigitaj en la bulgara organo "Internacia kulturo".

S-ro Dimitar Andrew, Assenovgrad, Bulgarujo, deziras korespondi kun aktivaj svedaj sportistoj. Ankaŭ kolektiva korespondado kun sportgrupoj diversaj estas dezirata.

ESPERANTOBLADET, Norvega Esperantisto, har som tidigare nämnts haft litet motigt vid starten på nytt. Det ser ut att lossna, och nu har det innehållsrika dec.-numret kommit. Vi få lov att hjälpa dem komma igång, och vi göra det bäst genom att prenumerera på tidningen — det är en bra tidning. Abonnementang för Sverige, 3:— kr. för året, kan t. v. endast ske genom Förlagsföreningen Esperanto, Fack 19071, Stockholm 19.

Læs "Sol og Sundhed"!

Organ for den danske Solsportbevægelse. — Tidsskriftet har nu igen optaget Esperanto i sine Spalter og gaar ud til mange Esperantister rundt om i Verden. Abonner paa det: 1 Kr. pr Nummer. Helaar 12.00. Fri-mærker modtages. Meget smukt illustreret. Skriv til Sol og Sundhed, R a n d e r s, Danmark.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

